# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 1 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 1
Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## Kristo la laboristo

Antaŭ nelonge 33 kardinaloj kaj 550 episkopoj petis la papon, enkonduki novan feston kun la nomo "Kristo la laboristo". Antaŭ kelkaj jaroj oni ankoraŭ diris "Kristo la reĝo". Oni ekkonas la interrilaton de religiaj formuloj kaj sociaj statoj. La reĝoj perdis sur tero sian valoron. La lastaj restaĵoj de feŭda epoko ekzistaĉas inter la diktatoreco de l' bankkapitalo. Nur kelkaj malspiritaj monarkistoj povis opinii, ke la popolo en memoro pri la bona malnova epoko reaktivigus la sentronigitajn princojn. La feŭdismo mortis; la burĝa kapitalo venkis super la feŭda grundrento; la regantoj de dia favoro notiĝas ĉe la burĝa borso sub "pari"; ne plu rekompencas sin ilin financigi, ĉar oni ne estas pagata per "animaj afektoj" de la mobilizita popolamaso. La majesto fariĝis figuro por vakspupejo; la "patro de l' lando" polvokovrita muzeaĵo. Kristo la reĝo perdis sian sencon.

Novaj sociaj problemoj ekestas kaj postulas religian aliformigon. La papo Leo XIII. elparolis ĝin en sia cirkulero pri la laborista demando (Rerum Novarum 15. 5. 1891):

1. La laborista demando staras en unua vico de nia tempo.

2. La demando estas malfacila, tamen ĝi povas kaj devas esti solvata.

Kaj la papo proklamas: 1. Per laboro la homo akiras rajtojn. — Certe estos 2. Laboro kaj mizero ĉiam sur tero. — Sed 3. La dogmo de alia mondo pacigas (!). — 4. Sen la eklezio solvo ne estas ebla. — Ne la socialismo sed 5. La eklezio proklamas la ĝustan doktrinon pri mono kaj kapitalo. — 6. La laborista klaso ricevas helpon de la eklezio; ĝi ekkonas en la laboristo la homon kaj la infanon de dio.

Kaj la papo admonas la ŝtaton, ke ĝi ankaŭ helpu ĉe la solvo de la laborista demando:

1. La ŝtato zorgu egale por ĉiuj, ankaŭ (!) por la laboristoj.

2. La ŝtato devas plibonigi la mizeran staton de la proletoj. (!)

3. Ĝi devas ĉesigi la strikojn aŭ, kio estas pli bona, ilin forigi. (Vidu Anglion kaj Italion.)

4. La deviga dimanĉripozo estu leĝe destinota kaj police kontrolota.

5. La ŝtato devas subpremi fiprocentegadon.

6. La paga demando estu reguligota en kristana senco.

Vidu, proletŝafo, kiel bone la eklezio zorgas pri vi! Se ne estus la eklezio, vi ne havus vian dimanĉripozon. Kaj por kristana pago ĉiam pledis la eklezio, precipe por — la alta salajro de ĝiaj episkopoj.

Kaj la papo postulas plie:

1. Estas organizendaj laboristaj organizoj.

Kompreneble ne la malbenitaj socialistaj organizoj, sed

2. Malbonaj societoj estu malpermesotaj. (!)

3. La celadoj, krei harmonion inter laboristoj kaj entreprenistoj, estas laŭdindaj.

4. La religio estu la fundamento!

Kio estas do kulpa pro ĉiuj mizeroj? La senreligieco. Proletŝafo, vi devas esti bona ekzemplo por la kapitalisto! Reiru en la eklezion, kiu varme zorgas pri vi. Laboru kaj preĝu! Tiam ankaŭ la kapitalisto estos kortuŝita kaj estos kristeca kaj ne plu ekspluatos vin!

Sed se vi helpos al vi per klasbatalo, tiam ankaŭ la kapitalisto povas koleri kaj uzi perforton. Kiu prenas la glavon, pereos per la glavo. Nur per amo povas esti savata la mondo. Enviciĝu en la de dio volita sociordo. Produktu plusvaloron kaj montru vian kristanan humilecon kaj sklavecon per pliigo de la profito. Tiam ankaŭ vi ricevos la kristanan parton de tiu ĉi profito. Kristo montris al vi la vojon. Li zorgis pri penegantoj kaj ŝarĝegitoj; li predikis kontraŭ la riĉuloj; li prenis sian krucon sur sin. Prenu ankaŭ vi, proletŝafo, vian krucon; tiam vi reviviĝos kaj sidos dekstre de dio kiel via lumanta idealo — Kristo la laboristo!

Prof. Hartvig.

---

## Al laboristaj korespondantoj-liberpensuloj de ĉiuj landoj!

Por plifaciligi korespondadon kun eksterlandaj laboristaj korespondantoj por nia semajna gazeto "Bezboĵnik" (Sendiulo) ni sciigas temojn, interesantajn nian legantaron en Sovetio. Nun ni petas korespondi pri jenaj temoj:

1. Politika agado de eklezioj en burĝaj landoj, konkretaj faktoj, atestantaj kontakton de Eklezio kaj Kapitalo.
2. De kiu eklezioj ricevas monon?
3. Kion la ŝtato elspezas por eklezioj, por popolklerigo, por senlaboruloj?
4. Kiel funkcias religiaj organizoj, kaj per kiaj metodoj ili varbas por siaj vicoj anojn?
5. Kiun influon havas la eklezio sur la ŝtataparaton?
6. Kiujn helporganizojn fondis la eklezioj, kaj ilia agado?
7. Kiel agas religiaj organizoj inter laboristoj, junularo, virinoj kaj infanoj?
8. Pri demando: Religio kaj lernejo.
9. Kiel rilatas la eklezioj al la revolucia laborista movado, al la strikoj?
10. Kiel rilatas la eklezioj al USSR?
11. Kvanto da religiaj organizoj proporcie al ties membroj.
12. Kiel agadas liberpensaj organizoj?
13. Procesoj kontraŭ blasfemuloj.
14. Diversaj statistikaj materialoj rilate al eklezio aŭ liberpensula movado.

Ĉio ĉi devas esti ilustrita per faktoj, ĉar nur tiuokaze ĝi efikos sur sovetian leganton. Al ĉiu korespondanto ni sendos n-ron de nia gazeto, en kiu estos presita lia korespondaĵo.

Nia adreso: Moskvo, Sretenka 10, Redakcio "Bezboĵnik", Redaktoro de "Bezboĵnik" Scheinmann (Ŝejnman).

---

## AL LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT

### El letero ricevita de la Sekcio

Pro kelkaj cirkonstancoj ni ne povis ĝustatempe respondi al vi. Ni salutas la de vi komencatan aferon — eldonon de ateista informbulteno por gazetservo. Ni opinias, ke ĝi helpos nin, provizante nin per eksterlanda materialo, kiu malbone venas al ni. Precipe ni dezirus skizojn pri ĝenerala situacio de eklezioj kaj sektanaj movadoj en eksterlando, plej aktualajn, ilustritajn per faktoj, ciferojn ktp. Ankaŭ estas interesaj por ni viglaj karakterizaj artikoletoj de laboristaj ateistkorespondantoj pri liberpensa proleta movado, saturitaj per faktoj, ilustrantaj agadmetodojn de liberpensul-organizoj. Ni provizos vian bultenon de gazetservo per nia sovetia materialo regule. Baldaŭ ekfunkcios nia informgazetservo ĉe CK de AU, kaj ni liverados ties bultenojn al vi ankaŭ regule. Ĉiujn viajn poŝtelspezojn por sendi al ni viajn materialojn, ni pagos plene, transsendante monon al vi dufoje dum jaro, same ni pagos vian poŝtan peradon por ni. Je la nomo de l' legantaro de "Bezboĵnik" ni salutas la sekcion okaze de 11-jara ekzisto de Sovetoj. Ricevinte vian salutleteron, ni deklaras ke sovetia ateistaro ĉiam estis en unuaj vicoj de batalantoj por mondrevolucio kaj nia kunlaboro batala en ateista fronto plisukcesigos, pliproksimigos la mondrevolucion.

Kun ateistaj salutoj al SAT-sekcianaj liberpensuloj

Membro de CK AU
Scheinmann (Ŝajnman).

---

## LA ALVOKO

en "S-ulo" n-o 213 ne havis la deziritan sukceson. Ĝis nun anoncis sian kunlaboron K-doj el jenaj landoj: Germanio, Hungario, Polio, Svedio, Norvegio, Svisio, Sovetio kun Blankrusio, Ukrainio. Aliaj landoj mankas ankoraŭ. Ni denove petegas la sendiulojn en SAT-rondoj vigle kunlabori por nia Sekcio. Pripensu! Se nia entrepreno fiaskus, la liberpensulaj organizoj jam uzante nian lingvon dubus pri la monddisvastigiteco de esperanto kaj forlasus nian movadon. La sampaĝe publikigita letero de redaktoro de rusa gazeto "Bezboĵnik" devigas vin al kunlaborego. Pro tio legu la alvokon en "S-ulo" n-o 213 kaj tuj anoncu vian helpon.

## NIA POŜTO

**5129.** Se vi kapablas, traduki la koncernan verkon de Hartvig en bonstilan esperanton, faru tion. Pri via alia propono ni nun ne povas diskuti; mankas ankoraŭ multe da helpantoj. — **8740.** Mono ne alvenis. — **5627.** Bezbojnik alvenis. Mi scipovas iomete la rusan; do sendu ruslingvajn sendiulaĵojn. — **Vaguloj.** Poste la faritaj multekostaj spertoj oni nur laboru per SAT-organizo. Liberpensula paĝo aperos, se eble, monate. La ĉefaĵo estas la gazetservo. — Individuaj leteroj pro poŝtelspezoj kaj tempomanko ne estas respondataj.